# TESTO 22

## **Ekzerco 1.** Kompletigu la vortspacon.

**1.** Pro karta preno perdiĝis ␣ **i** ␣ **n** ␣.

**2.** **L** ␣ **r** ␣ ␣ ␣ ŝuldon ne pagas.

**3.** Valoron de objekto ni ekkonas post ␣ ␣ **f** ␣ ␣ **t** ␣.

**4.** Antaŭ nelonge, Nederlando ekstradiciis sian ŝtatanon, disko-ĵokeon el urbo Zwolle, ĉar en Usono oni kulpigis lin pri posedo de eta ␣**v**␣ **nt** ␣ de haŝiŝo.

**5.** Markus subite ekstaris, serĉis iomete en sia poŝo, enbuŝigis ␣ ␣ **g** ␣ **r** ␣ **d** ␣ ␣ kaj ekbruligis ĝin.

**6.** Grigorij Arosjev estas juna moskva ␣ **o**␣ **t** ␣, kies unuan poemkolekton antaŭis oftaj publikigoj en kelkaj rusiaj esperantaj periodaĵoj.

**7.** Se vi scias, ke vi ␣**v**␣ **t** ␣ ␣ dum longaj promenadoj aŭ sportado, viaj subvestoj estu sintezaj kaj lasu la humidon eniri.

**8.** La virino en funebra vesto levis la ␣ ␣ **l** ␣ ␣ vizaĝon kaj rektigis sian elastan talion.

**9.** Post la promenado ĉiuj ĝuis bongustan dimanĉan tagmanĝon kun patkukoj kiel ␣ ␣ **s** ␣ **rt** ␣.

**10.** La brita ĉefministro Tony Blair ŝajne pli **f** ␣**v**␣ **r** ␣ ␣ la eŭron ol sia potenca kaj respektata ministro pri financoj, Gordon Brown.

## **Ekzerco 2.** Finskribu ĝustan vorton.

**1.** Kiam savarmeanino June Preddy malsaniĝis, ili aĉetis por ŝi florojn kaj **ĉ** ␣ **k** ␣ **l** ␣ **d** ␣ ␣ ␣.

**2.** Ankaŭ en la kono de la instalaĵoj estas hierarkio: la ĝenerala **d** ␣ **r** ␣ ␣ **t** ␣ ␣ ␣ scias kiel manipuli, la ĵus alveninta volontulo stumblas en kelkaj misoj.

**3.** Laŭlonge de la interurbaj vojoj oni vidas multajn **r** ␣ **s** ␣ ␣ **r** ␣ **c** ␣ ␣ ␣ ␣ kaj motelojn kun naĝejoj.

**4.** Via desegno estas preskaŭ tute kovrita per tro krudaj **s** ␣ **r** ␣ **k** ␣ ␣ de krajono kaj fariĝas por la okulo de la rigardanto preskaŭ enigma, nekomprenebla, nigra strio.

**5.** La pulmokancero jam delonge superis nombre la kanceron de **s** ␣ ␣ **m** ␣ **k** ␣, la pasintece plej oftan kancerspecon.

**6.** Aliflanke la eteco de boato estigas riskon en lago, kiu kutime sovaĝiĝas tre rapide, tion ni spertis dufoje, kiam la ondoj **r** ␣ **nv** ␣ **r** ␣ ␣ ␣ nian boateton.

**7.** La opozicio laŭte **p** ␣ ␣ **t** ␣ ␣ **t** ␣ ␣ argumentante, ke la situacio neniel rajtigas speciale urĝan traktadon de la nova leĝpropono.

**8.** Kiam oni juĝas pri homoj, oni devas ja **k** ␣ **n** ␣ ␣ **d** ␣ **r** ␣ iliajn kutimojn kaj tiun vidpunkton, el kiu ili rigardas la vivon kaj ĝiajn aferojn.

**9.** Nokte nedormemuloj promenis al **p** ␣ ␣ **ks** ␣ **m** ␣ ␣ montetoj por sledi kaj amuziĝi en neĝo.

**10.** La polico enketis la morton de la infano kaj decidis, ke temas pri nura **a** ␣ **c** ␣ **d** ␣ ␣ **t** ␣.

## **Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

| lepor', sonor', tomb', glob', stult', komitat', fianĉ', blond', membr', diligent'. |
|---|

**1.** La pastroj balancadis la fumilojn kaj la **g** ␣ **f** ␣ ␣ ␣ **ĉ** ␣ ␣ donis unu al la alia la manon kaj ricevis la benon de la episkopo.

**2.** En mondo de ␣ ␣ ␣ **b** ␣ **g** ␣ **d** ␣ kaj de tutmonde reganta profit-kapitalismo unuopaj registaroj havas nur tre limigitajn eblojn por regi, reformi, ŝanĝi.

**3.** Miaj esperantaj agadoj inkluzivas la ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ **t** ␣ **n** ␣ **c** ␣ ␣ en Esperanto-Asocio de Britio, administradon de reta kurso, tradukadon, kaj kunlaboron en la nova eldono de PIV.

**4.** En multaj landoj de Eŭropo rostita ␣ ␣ ␣ ␣ **r** ␣ **ĵ** ␣ kun krema saŭco, rizo, kaj juniperaj beroj kune kun ruĝa vino estas tre ŝatata manĝaĵo.

**5.** Se ekzameni la ideologian konsiston de la ␣ ␣ **m** ␣ ␣ ␣ **r** ␣ de UEA, Moya rimarkas, ke ofte la gvidantoj timis la zamenhofan internan ideon.

**6.** Sub la fenestrobreto estis kaŝita sekreta butono de ␣ ␣ **n** ␣ ␣ ␣ **l** ␣, unu sonoro signifis "venu", du "urĝe venu", tri "danĝero".

**7.** Nur en la lastaj jaroj de la dudeka jarcento aperis en irlandaj ␣ ␣ ␣ **b** ␣ **j** ␣ ␣ tomboŝtonoj sur la lastaj kuŝejoj de irlandaj soldatoj mortintaj en la unua kaj dua mondomilitoj.

**8.** La policestro komencis altrudi sin al Katjuŝa kaj, kiam li estis aparte agema, ŝi ekscitiĝis, nomis lin ␣ ␣ ␣ ␣ **t** ␣ **l** ␣ kaj maljuna diablo kaj tiel forte puŝis lin, ke li falis.

**9.** Interesitoj pri la tasko, per kiu ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ **n** ␣ ␣ **l** ␣ ␣ eĉ povas iom enspezi, bv. kontakti la Direktoron de la Centra Oficejo de UEA.

**10.** La parlamentanino diris, ke la telefonkompanio per sia reklamo substrekas la stereotipon de ␣ ␣ ␣ **n** ␣ ␣ **l** ␣ **n** ␣ kiel senespera idioto, plue ĝi sugestas, ke virinoj pli stultas ol viroj.

## **Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

1. Ĉiu regimento havis sian ___ por la ekzercoj, kie tutan tagon oni uzis ŝtonĵetilojn, aŭ arkpafis al ŝildoj, starigitaj en interspaco de cent ĝis ducent paŝoj.

**a.** larmon **b.** placon **c.** kvanton **d.** ŝviton

**2.** La grafikisto ŝatas bildigi stratojn, ___, placojn de Sofio kaj en liaj pentraĵoj senteblas la amo de la pentristo al la malnova bulgara ĉefurbo.

**a.** tapiŝojn **b.** salajrojn **c.** ŝultrojn **d.** parkojn

**3.** Nero almetis ponardon al la kolo, sed li pikis sin nur per la timema mano kaj videble estis, ke neniam li kuraĝos enprofundigi la ___.

**a.** relon **b.** klingon **c.** rizon **d.** manikon

**4.** Finnaj familioj ŝatas posedi somerdometon ĉe lago- aŭ mar-bordo: kelkaj posedas eĉ tutan insuleton, tien ili rifuĝas dum ___ kaj semajnfinoj, se urba vivo iĝas netolereble stresa.

**a.** rokoj **b.** membroj **c.** ferioj **d.** manteloj

**5.** Mi rimarkis ankaŭ, ke tiu vojo estis disigita de la tuta senfina areo malantaŭa per vico da egale kurbaj fostoj interligitaj per metalbrilaj ___ kun pikiloj.

**a.** dratoj **b.** marteloj **c.** komitatoj **d.** societoj

**6.** Fakte ĉiuj aliaj verkoj de Doyle falis en la ___ de forgeso, nur Holmes postvivas.

**a.** kataron **b.** puton **c.** sonoron **d.** larmon

**7.** Decembre 1999, la petrolŝipo *Erika* rompiĝis en du partojn en la Biskaja Golfo, ĉirkaŭ 70 km de la franca marbordo, kio kaŭzis marpoluon je ___ neniam vidita en Eŭropo.

**a.** tubo **b.** etaĝo **c.** tondro **d.** skalo

**8.** Se viandaĵon oni ne konservas en malvarmigejo, la mikroboj rapide reproduktiĝas, sekve povas esti malpurigitaj ankaŭ akvo, laktaĵoj, ___, salatoj.

**a.** bicikloj **b.** aŭtobusoj **c.** sukoj **d.** arboj

**9.** Mi ne tute komprenis, kial John tiom ŝatis ___ sur tiu relative malvasta tereno en la malgranda Irlando, kiam li ĉiam havis okazon libere galopi sur la vastegaj sudamerikaj ebenoj.

**a.** aspekti **b.** ŝirmi **c.** ekzameni **d.** rajdi

**10.** Ned ne sentis ian doloron, tamen li konsciis, ke sur liaj brusto kaj maldekstra kruro estis longaj vundoj, kaj ke la kruro estas grande ___.

**a.** milda **b.** humila **c.** ŝvelinta **d.** freneza